# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 17/10/2019 Kvarcentkvardeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)**

## Rapide ekrigardu ĉiujn titolojn.


## Legu tiujn kiuj interesas vin

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**Uzindaj ligoj** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

## Entute 816,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **299,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **281,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)


Nun studas **236,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*



## Gramatika serio "La Verbo en P.A.G.". N.ro.89




Por la maniero la tabelvorto estas "iel". Ĝi signifas "en iu maniero" kaj "en tiu maniero" kaj "en kiu maniero kaj en neniu maniero" kaj "en ĉiuj manieroj": "Mi iel devos sukcesi" kaj "Kiel ci fartas?".

Sed PAG faras la (kvankam komunan) gravan mallogikan kaj nenecesan eraron aserti, ke en multaj kazoj (sed ne en ĉiuj!) oni povas uzi "tiel" kaj "kiel" anstataŭ "tiom" kaj "kiom", se oni volas. Tiu stranga ideo similas al diri, ke se oni volas oni povas diri "tablo" se temas pri seĝo. Mi konsilas ne sekvi tiun idiotaĵon.

PAG mencias, ĝuste, ke same kiel ĉe la aliaj tabelvortoj, la "k-" formo povas uzati KAJ kiel adverbo (aŭ adjektivo aŭ substantivo) AŬ kiel subjunkcio: "Li ne faris tion, kiel mi konsilis." kaj "Mi ne scias, kiel li sukcesis" (adverboj) kaj "Li iris al Suomio, kiel mi aŭdis" kaj "Kiel supozita, li decidis ekloĝi tie" (subjunkcioj). Ankaŭ subjunkcio en "Mi ne estas naiva, kiel vi pensas". (daŭrigota) *Marcel Leereveld*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# La Manlia Esperanto-Klubo







Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm ĝis 12 tagmezo, Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagota kafo atendas vin. La 5a de oktobro estis la unua sabato. Venis Roger, John, Michael kaj Ian. *Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★




Sabato 12 Oktobro 2019, 15:00 – 21:00

Esperanto NSW havos budon kun informaĵoj kaj aĵoj vendotaj, kaj ankaŭ instruos Esperanton ĉe "*Language Lounge*" inter 17:30 kaj 18:00

Pli da informo: MaitlandRiverlights.com.au

La sekvan tagon (dimanĉon, 13 Oktobro), inter 10:00 kaj 12:00 okazos "Bombardado de ideoj" (*Ideas Bombing*) pri "Esperanto – Internacia Komunikado"
ĉe "Zara's House": 1a Hill St, Jesmond NSW (Newcastle)

Esperantistoj estas bonvenaj!

Raportas *Andrew Spannenberg* telefono: 0422 015 430 retpoŝto: aspannenberg@icloud.com

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★




*Peter Danzer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Roger Springer kun siaj (ne-esperantistaj) gefiloj



Louise 55jara Mark 58jara Gary 60jara Wayne 62jara Roger 88jara

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*



# Oni ne dilas en mia ĝardeno.

**PERTO KAJ PERTHO, LA RESTO NE GRAVAS** (ĉar en Usono) .

Se oni volas esperantigi la nomon de sia urbo, ĝi devas esti sufiĉe grava en la mondo. Mi plurfoje vizitis Perth en Skotlando, kaj ĝi estas pli granda ol Perth en Vestralio, pardonu min. Tial mi opinias ke la skota urbo havas pli da rajto nomi sin esperante, ol la vestralia, kiun mi vizitis nur tri fojojn en la tuta vivo. Ĉar mi kompreneble ne scias du Melburnojn en la mondo, mi neke deziras du Pertojn en la mondo. Ĉar la skotoj, sendube por ne elspezi tro por la literoj, elektis "Perto", mi ne povas ne uzi "Pertho" por la vestralia urbeto. Mia alternativo estas nur uzi "Perth".

Sed, sciate de ĉiuj kaj sciate pro Vera, ili havas brilajn ideojn. Unu tia estas ne permesi en la Esperantaj kunvenoj uzi la anglan lingvon, angloparoli aŭ anglumi. Certe tio helpos la

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

komencantojn. En Melburno ni kutime praktikas tiun kutimon, strange escepte kiam ĉeestas komencanto. Antaŭ pluraj jaroj ni eĉ havis la regulon, ke oni devas pagi al la klubo por ĉiu angla vorto uzata. Sed tio ne daŭris longe, ĉar neniu volis administri la regulon. Krome oni kelkfoje devas kompari anglajn vortojn inter si aŭ kun Esperanto.

En Amsterdamo (ekzistas nur unu Amsterdamo: la aliaj estas "Amsterdam") en 1934 mi lernis Esperanton per radiolecionoj, kaj post tio ekmembriĝis al unu el la trideko da Esperanto-kluboj en tiu urbo. Mi ankoraŭ ne lernis paroli jam, kaj dum duona jaro mi sidis du horojn ĉiusemajne ne dirante unu vorton, ĉar ĉiuj parolis en Esperanto, kaj flue. Mi tamen dum tiu tempo lernis paroli nur per aŭskultado, kaj post ses monatoj mi komencis flue paroli kaj neniu povis haltigi min. Kaj mi tuj aliĝis al la internacia S.A.T.-kongreso en Parizo.

Do, bonan ŝancon al Pertho! Sed mi ne petus permeson al Kroko, ĉar li estas nur Dilo.

*Marcel Leereveld* .

## LA REGULO PRI SPECIALECO .

En Esperanto Zamenhof zorgis, ke la gramatikaj reguloj ne havas esceptojn, escepte de pluraj naturaj esceptoj, kiujn oni ne povas eviti ĉar la naturo trudas ilin sur nin.

Unu regulo en Esperanto pri la formado de kunmetaĵoj, inkluzive de la afiksoj kaj finaĵoj, diras ke la ĉefelemento de kunmetaĵo venas laste antaŭ la finaĵo. Alia regulo pri kunmetado diras, ke ne troviĝu io ajn inter la elementoj escepte de la sensenca litero "o", se volate.

Tria regulo diras, ke devas ĉeesti ĉe la ĉefelemento la nocio, neesprimata, de specialeco. Ĉi tiu regulo ne havas esceptojn, se temas pri kunmetaĵo de kies ĉefelemento estas ordinara substantivo. Ekzemple, "tablotuko" estas nur SPECIALA tuko, speciale uzata kaj fabrikita por esti sur tablo. Se la tuko estas nur hazarda tuko, normale ne uzata kiel speciala tablotuko, ĝi NE estas "tablotuko", sed tuko hazarde sur la tablo aŭ nur unufoje uzata "tuko sur la tablo" Same la "tersurfaco" estas la speciala ĉiama tuta surfaco de la tero, dum la surfaco de la tero en via ĝardeno estas "la surfaco de la tero". Same: "Manlaboro" estas ĉiuj formoj de laboro per la mano, dum se vi ne estas manlaboristo sed hodiaŭ faras iom da laboro per la manoj, via laboro estas "laboro per la manoj". Same: "akvoforfluejo" estas speciale farita por regule prizorgi la defluadon, dum se ĝi estas nur hazarda loko kie iu akvo povas forflui, ĝi estas "forfluejo por la akvo". Ne ĉiam tiu specialeco estas tiom klare videbla, sed ĝi estas tie.

Ĉeestas pluraj naturaj esceptoj, kiam la ĉefelemento estas afikso. Tiaj esceptoj estas naturaj, ĉar la afikso jam mem ĉiam enhavas la signifon de specialeco, ĉar ili malofte okazas nekunmetitaj. . Ni rigardu, ĉe kiuj la specialeco pli aŭ malpli montriĝas, kaj samtempe la malsamajn signifojn de la aparta esprimo kaj la sinteza formo. Ni rigardos nur la oficialajn.

La finaĵoj, o, a, e, i, as, is, os, us, u, j kaj n jam estas "specialecaj", ĉar ili ege malofte uzatas aparte, kiel "la o ĝardena" aŭ "ŝi us reveni", formoj neniam uzataj. Tiuj finaĵoj do laŭnature estas ĉiam "specialaj".

Ankaŭ la prefiksoj jam nature kreas vortojn kun speciala signifo. El "bo, dis, ek, eks, ge, mal, mis, pra, kaj re" nur "dis kaj mal" havas memstaran uzon en "dise" kaj "mala", sen specialeco.

Multaj el la sufiksoj, kiuj ja ĉiuj havas nature la signifon de specialeco, havas uzatajn formojn apartajn. Ĉi lastaj donas iomete malsaman signifon se uzataj kun substantivo aŭ verbo KAJ aparte KAJ sinteze. Jen ĉiuj sufiksoj:

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

"AĈ": "Kondutaĉo" estas speciala speco de konduto, ĉiama, sed "aĉa konduto" estas unufoja konduto malbona.

"AD": "manĝado" estas la normala ago, dum "ade manĝi" estas nekutime longa afero.

"AĴ": aparta formo uzatas nur kiel substantivo por indiki ion kio ne estas homo aŭ besto aŭ planto, kiel en "En la neuzata aŭtomobilejo ni metadas tre malofte uzatajn aĵojn".

"AN": aparta formo uzatas nur kiel substantivo: "La anoj de nia klubo".

"AR": kutime ne havas apartan uzon, kvankam eblan por "grupo".

"EBL": apartaj "ebla/e/o/i" sufiĉe ofte uzatas: "La ebloj estas multegaj".

"EC": formas abstraktajn kvalitojn: "Ŝia klereco". Kelkfoje uzatas sola por indiki "kvalito"n.

"EG": uzatas aparte kiel adverbo, kaj kelkfoje kiel adjektivo: "Ege bezoni; ega bezono".

"EJ": indikas specialan lokon kie iu ago regule okazas: "lernejo" . Uzata kelkfoje kiel substantivo por signifi lokon kie oni faras ion regule: "La ejoj por restigi aŭtomobilojn".

"EM": La substantivo "emo" kelkfoje uzatas, por signifi tendencon al iu ago: "Lia emo bicikli".

"END": apartaj formoj ne uzatas.

"ER": la sufikso "er" havas tre fortan senzon de specialeco (kiel "ar"), ĉar temas nur pri unu speco de "ero" (kaj de "aro"). Ankaŭ aparte uzata por signifi "egalaj partoj"n

"ESTR": uzata aparte kiel verbo kaj kiel substantivo: "Li hodiaŭ estras la kunvenon".

"ET": uzatas aparte kiel adjektivo nur: "Mia eta infano".

"ID": aparte uzatas tre ofte kiel substantivo nur: "Liaj idoj estas du filoj kaj ses genepoj".

"IG": aparte uzatas nur kiel verbo, kaj tre ofte: "Ŝi igis ŝin purigi la ĉambron".

"IĜ": detempaltempe uzata , cetere plej ofte malĝuste, kiel verbo : "Li iĝis purigisto".

"IL": ĉar mankas propra radiko por tiu signifo, ĝi estas tre ofte uzata aparte kiel (nur) substantivo: "Mi devas serĉi la ilojn por ripari la barilon".

"IN": uzata aparte kiel substantivo kaj kiel ĝia adjektivo: "Ĉu ekzistas inaj laboroj por inoj?".

"IND": malofte uzata aparta: "Tio indas fari".

"ISM": aparte uzata nur ege malofte.

"OBL": aparte uzata nur ege malofte.

"OP": aparte uzata nur ege malofte.

"ING": aparte uzata nur ege malofte.

"IST": neniam uzata aparte.

"ON": aparte uzata nur ege malofte.

"UM": Neniam uzata aparte.

"UJ": aparte ofte uzata por indiki enhavilon ĉar mankas propra radiko por tiu signifo: "Mi bezonas ian ujon por meti tiujn pinglojn".

"ANT, AT, INT, IT, ONT, OT": ili kelkfoje jam uzatas, kiel adjektivo, sed malofte, escepte en la prepoziciaĵoj "ante al" kaj "ate de", kaj kiel la pasivovoĉa verbo: "La manĝo preparatis frue".

*Marcel Leereveld.*

**KROKODILI AŬ NAJTINGALI ?**

Ofte la Geesperantistoj pensas, ke mia malamo ante la vorton "krokodili" estas pro tio, ke ĝi estus neologismo en Esperanto.

Tio tute ne estas la kazo. La malbeninda vorto tute ne estas neologismo, ĉar ĝi estas figursenca uzo de oficiala vorto formita el du oficialaj radikoj: "krokodil" kaj "i". Mi kelkfoje

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

mem uzas vortojn en sia figura senco, kaj ŝatas kaj admiras la diversajn formojn de tropo, figura senco.

Mi malŝategas la figuran vorton pro tio ke ĝi estas arte, kaj estetike, la plej malbona ekzemplo de tropo. Ekzistas neniu kuneco inter krokodilo kaj nacilingvumi, kaj en etnaj lingvoj oni ne uzus tian tropon pro ĝia malkareco kaj manko de arto. Etnaj lingvanoj tuj sentus tion kaj ne kuraĝus uzi, pro sia bonsenco por estetiko, ĝin en siaj belaj lingvoj. Alivorte: uzi tiom sensencan tropon malvalorigas Esperanton kaj la Esperantistojn. Ĝi montrus al la etnaj parolantoj kiom malkara kaj senarta la Esperantistoj estas, kaj mi hontas pro tio. Mi publike hontas nur en Esperanto, ĉar mi volas ke la ne-Esperantistoj ne sciu kiom malmulte da estetika sento havas la Esperantistoj ĝenerale kaj speciale la inventinto de la tropo. Kaj mi esperas ke ankaŭ vi, miaj Esperantaj gefratoj , ne informu la ceteran mondon ne-Esperantistan. Se iu estetikema samideano nur estus inventinta anstataŭan artecan tropon por nacilingvumi. Sed eĉ tiam troa uzo de tropo malplivalorigas ĝin.

*Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Kara Roger, Bonvole akceptu mian aldonon nomitan "KVINESENCO" por via grava gazeto. Korajn bondezirojn, *Erhard Claus*

# KVINTESENCO

Laŭ la Oxforda Vortaro Quintesenco estas:

1. La plej aŭ tipa ekzemplo de kvalito aŭ speco.
2. Rafinita esenco aŭ ekstrakto de unu substanco.

Origino el Latino « quinta essentia » = « kvin esenco » el la antikva kredo, ke kvina substanco ekzistus plie al la kvar elementoj, kiuj estas Tero, Akvo, Aero kaj Fajro.

La kvina elemento ja ekzistas kaj ĝi estas konata per la vortoj Vivo, Spirito, Animo, Menso, kiuj estas pli aŭ malpli tute la sama aĵo. Vivo sur tero ne ekzistus sen SPIRITO, TERO, AERO, AKVO kaj FAJRO.

La spirito-elemento estas pli granda ol la aliaj kvar. Ĝi etendas en ĉiun vivaĵon sen esti parto de ĝia substanco.

La animo aŭ spirito, kiu estas same, ne estas parto de karno kaj sango aŭ la DNA. La animo mistere envenas la embrion el nenie kaj kreskos kun la korpo en sama formo ĝis la morto de la korpo, kiam ĝi disiĝos kaj daŭros ĝian vivon en la regno de Spirito ankaŭ konata 'Paradizo'. (Religio absolute ne havas parton en tiu okazo.) Nur harmonaj animoj povas eniri tiun regnon. Malbonaj animoj devas havi purigon en alia regno, kiu povus daŭri centojn da jaroj. La malglora imperiestro Nero por ekzemplo restadis en infero ĉirkaŭ 500 jarojn. Li mortigis, torturis kaj brulugis vive preskaŭ du mil homojn.


Kiom multe da jaroj ene de infero suferos tiuj, kiuj kaŭzas militojn, kiuj difektas milionojn. Ne multe da potenculoj eskapos inferon. Reĝino Elizabeth la Unua povis eniri la Paradizon nur antaŭ ĉirkaŭ cent jaroj.

Kvankam la spirito de homo ne estas parto de lia karno kaj ne povas morti, ĝi povas esti difektita per drogoj. Tial, ne prenu tiujn !

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



# 3zzz



La elsendo de la 30a de septembro 2019 substrekas la rolon de virinoj en la pasinteco . Eksciu pri la pionirinoj hispanaj kaj virinoj tra la mondo, kies inventaĵoj daŭre faciligas nian tagan vivon .

**GRAVA ANONCO**

Kiel ĉiun jaron la radio 3ZZZ kolektas donacojn de la 7a de oktobro ĝis la 21a. Necesas $1000 por ĉiu horo da programo. Se vi deziras ke la elsendo en Esperanto daŭrigu , bonvolu donaci monon. Eblas tion fari per la reto ( ne forgesu mencii ke via donaco iras al la Esperanto grupo) kaj sciigu nian kasiston Heather je la adreso erikino.48@gmail.com. La teamo antaŭdankas vin . la kunvokanto *Franciska Toubale*

# La Aŭstraliaj Kluboj http://aea.esperanto.org.au/local-groups/

**Brisbana Esperanto-Societo** Petro Danzer **Tel:** 0402 766 557
**Retpoŝto:** brisbane@esperanto.org.au

**Central Coast and Newcastle Esperanto Club** Joanne Cho Tel: 0413 087 340
Retpoŝto: centralcoast@esperanto.org.au

**Esperanto Coffee Club of Canberra** Huigh Malcolm Tel: (02) 6288 4334
Retpoŝto: canberra@esperanto.org.au

**Esperanto Federation of New South Wales** Tel: (02) 9319 4775
Retpoŝto: nsw@esperanto.org.au

**Esperanto in South Australia** Indrani Beharry-Lall Tel: (08) 8285 3128
Retpoŝto: sa@esperanto.org.au

**Esperanto League of Western Australia** Shayne Power Tel: (08) 9343 9532
Retpoŝto: esperantowa@hotmail.com

**Manly Esperanto Club** Roger Springer Tel: (02) 9976 6320
Retpoŝto: manly@esperanto.org.au

**Melbourne Esperanto Association** Heather Heldzingen Tel: (03) 9525 4295
Retpoŝto: melbourne@esperanto.org.au

**Tasmanian Esperanto Society** Kam Lee Tel: (03) 62251474
Retpoŝto: tas@esperanto.org.au

**Torquay Esperanto Coffee Club** John Adams Tel: (03) 5261 2899 / 0421 043 272
Retpoŝto: torquay@esperanto.org.au

**Tuvumba Esperanto-Societo** Hazel Green **Tel:** (07) 4691 1238
**Retpoŝto:** toowoomba@esperanto.org.au

**Se informon pri via klubo mankas aŭ eraras informu min.** *Roger Springer* rspring@tpg.com.au

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***